

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

7 NOVEMBRO 1978  
66-A JARKOLEKTO

ISSN 0014-0694  
FONDITA EN 1913

## Språken inom EG


Inom EG diskuterar man flera länders anmälningsansökningar. En fråga som kommit i blickpunkten i somras i samband med dessa diskussioner är språkfrågan. EG har nämligen haft principen att alla medlemsländernas språk ska vara likställda (även om man syndat mot den ibland); de nya ländernas språk (Grekland, Portugal, Spanien) borde också bli det. Men det har antytts att man kanske borde frågå den principen och begränsa de mindre språkens rättigheter.

Den engelska tidskriften *The Economist* har undersökt vad språkfrågan har för betydelse för EG. Vi skulle helst ha översatt hela artikeln (den finns i numret daterat 12 augusti 1978), men den är för lång för *La Espero*. Låt oss därför nöja oss med en resumé.

### Flest tolkar av alla

EG har fler tolkar anställda (400) än någon annan internationell organisation, faktiskt nästan dubbelt så många som FN, Unesco, NATO, OECD och GATT tillsammans! Det betyder att en stor del av de anställda sysslar med översättningar. *The Economist* anger några procentsatser: av alla anställda med akademisk utbildning sysslar 36% med översättningar. Procentsatsen är högre inom vissa delar: 54% inom EG-parlamentet, 62% inom ekonomiska och sociala utskottet, 63% inom ministerrådets sekretariat.

Organisationen har idag sex officiella språk. Om det blir nio, skulle (teoretiskt) 72 tolkar be-



'Babel-explosionen' kallar *The Economist* detta diagram. Vänstersida (med linje) anger antal sammanträdesdagar, högersidan m. staplarna antalet tolkdagar inom EG. 1978 är de säkert över 80 000.

höva tjänstgöra samtidigt för att tolka mellan dessa nio språken. I praktiken skulle 30 kunna kalra det jobbet, eftersom tolkarna i regel kan tolka mellan flera språk. Problemet är att hitta tolkar mellan de mindre språken (t.ex. danska-grekiska).

Ett annat problem är kostnaden. 1977 fick EG betala ca 10 miljoner pund för tolkning. Tre nya språk skulle fördubbla den kostnaden.

Översättningar av skrivna dokument är lättare att lösa. EG har beräknat att 90 översättare per språk skulle klara det

jobbet.

### Praktiken annorlunda

Medan alla språk är likställda, teoretiskt, är det inte så i praktiken. Irland har avstått från att använda gaeliska (utan för vissa viktigare dokument), andra språk har helt enkelt tvingats att anta en andra rangs plats. Det gäller främst danska. [Vi återkommer till danskans ställning i en kommande artikel.] De dominerande språken har blivit engelska och franska, med tyska som god tvåa.

Försök att begränsa antalet

använda språk har gjorts, men någon politisk lösning anser inte *The Economist* vara möjlig. «Om bara engelska användes», skriver tidningen, «skulle fransmän protestera; dessutom talar många fler kommissionstjänstemän franska än engelska. Om bara franska användes, skulle britterna protestera; trots allt är engelska mera allmänt använt för internationella förhandlingar. Om man tog både franska och engelska, skulle tyskarna protestera. De säger, med rätt, att fler människor i Europa talar tyska än franska; därför skulle tyska få vara med. Men en fransk-engelsk-tysk trespråkig lösning skulle väcka protester hos italienare, holländare och danskar.»

### Dåliga språkkunskaper

Problemet är egentligen det att allt för många politiker är inblandade i EG-kommissionens arbete; diplomaternas språkkunskaper brukar vara större. Därför går de olika lösningarna som diskuteras ut på att minska antalet möten med politiker inblandade och utöka antalet «fackmöten», där bara diplomater är med.

Men dåliga språkkunskaper är inte något som bara politiker lider av. *The Economist* redovisar i samma nummer en undersökning om ungdomarnas (12 — 23 år) språkkunskaper, 53% av de tyska ungdomarna, 68% av de brittiska och 55% av de franska uppger själva att de inte kan läsa en tidning på ett annat språk än sitt eget.

Sammanställt av  
Franko Luin



## La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet  
Adress: Box 4009,  
122 04 Stockholm-Enskede  
Ansvarig utgivare:  
Bertil Åkerberg  
Redaktör: Franko Luin,  
Myggdalsvägen 123,  
135 42 Tyresö  
Telefon hem: 08 - 712 82 91  
I redaktionen: Sven  
Alexandersson, Åke  
Blomberg, Anita Lindblom,  
Geoffrey Sutton  
Prenumeration: 40 kronor  
per år, postgiro 20 12 - 3,  
Esperantoförbundet  
Tidningen utkommer med  
8 nummer per år: i februari,  
mars, april, maj, september,  
oktober, november och  
december  
Manusstopp: den 10, måna-  
den före utgivningsmånaden  
Fotosats: Esperantoförbundet  
Tryck: Sturetryckeriet AB,  
Stockholm 1978

## Esperantoförbundet

Postadress: Box 4009,  
122 04 Stockholm-Enskede  
Besöksadress: Hägerv. 31,  
(T-station Tallkrogen)  
Telefon: 08 - 48 99 76  
Förbundets expedition har  
öppet tisdagar kl. 18 — 20  
Postgiro: 20 12 - 3  
Medlemsavgift: direkt-  
ansluten medlem 50 kronor,  
ungdomsmedlem under 26 år  
25 kronor, familjemedlem  
utan tidning 15 kronor  
Prenumerationsavgift för *La  
Espero* och *Esperantonnytt*  
ingår i medlemsavgiften.  
Medlemmar under 30 år får  
dessutom ungdomsförbundet  
SEJUs blad *ktp*.

## Esperantoförlaget

Postadress: Fack,  
200 42 Malmö  
Besöksadress:  
Möllevångsgatan 20 B  
Öppettider: 1 sept — 15 maj:  
onsdagar kl. 10 — 11,  
torsdagar kl. 17 — 18  
Skriftliga beställningar  
expedieras hela året, även  
under sommaren  
Telefon: 040 - 12 20 29  
Postgiro: 578 - 5  
Expedition:  
Anna-Greta Ströme  
Medhjälpare: Wivi Nilsson  
Styrelsens ordförande:  
Åke Blomberg

# JES & NE

## Även lämplig som mini-utställning

*Esperanto idag* heter en ny ut-  
ställning i stort format, men  
även en ny broschyr. En av vå-  
ra medlemmar har gett oss tip-  
set, att det går utmärkt att göra  
broshyren till en mini-utställ-  
ning att sätta upp på arbets-  
platser. Allt vad man behöver  
är två broschyrer och lite tejp.

## Esperanto som FN-språk?

Den här notisen hittade vi i  
*Göteborgs-Posten* av den 2 no-  
vember. Även om Kurt Wald-  
heim inte tycks vilja ha espe-  
ranto i FN, så finns det andra  
som vill det. Det lär t o m finnas  
en påtryckningsgrupp för espe-  
ranto inom FN.

## Kom ihåg jubileet

Deklarationen om de mänskliga  
rättigheterna 'fyller' 30 år i år.  
Har din klubb tänkt på att upp-  
märksamma jubileet på något  
sätt?

## Esperantonnytt reas bort. Passa på!


Nu har Esperantoförbundet be-  
slutat sig för något så ovanligt  
som rea. Det som reas är *Espe-  
rantonnytt*, specialnummer 77/78  
som finns kvar i några tusen  
exemplar.

Orsaken till en så ovanlig åt-  
gård är att tidningen inte kan  
ligga hur länge som helst i la-  
ger. Den blir fort för gammal.

Om du har användning för  
några hundra (eller tusen) tid-

ningar, passa på nu. Du får 500  
tidningar för 75 kronor. Då är  
även portot betalt. Men du må-  
ste beställa före årets slut. Sen  
makuleras det som är kvar.

## Sigvard Håkansson forlasis nin



Unu el la plej malnovaj mem-  
broj de Grupo Esperantista de  
Stockholm, **Sigvard Håkansson**  
forlasis nin por ĉiam post longa  
malsano la 23-an de oktobro  
en la aĝo de 66 jaroj.

Dum multaj jaroj li estis unue  
sekretario kaj poste prezidanto.  
Li multe kontribuis al la grupa  
laboro, prelegis, verkis kaj ludis  
teatraĵojn, gvidis kursojn kaj  
lerte interpretis vizitantojn el la  
tuta mondo. Li ankaŭ korektis  
la korespondan kurson de SEF.

Mi memoras mian 'promenan  
kurson' de la fruaj tridekaj ja-  
roj, kiam li dum nia hejmenir-  
ado de la tiama klubejo en Wal-  
lingatan donis al mi bonan in-  
strukcion en nia lingvo.

Grupo Esperantista funebras  
sian kunlaboranton kaj amikon.  
Al la familio ni transdonas ni-  
an kondolencon.

Bertil Åkerberg

dje  
rec-  
för  
rna  
a.  
om  
den  
dö-  
gare  
ska  
för  
de i  
let  
ter"

## För dyrt med flera FN-språk

New York (TT-Reuter): En rap-  
port av FN:s generalsekreterare Kurt  
Waldheim rekommenderar organisatio-  
nen att inte utöka listan med språk,  
till vilka alla debatter i FN tolkas. Nu  
är de sex: arabiska, kinesiska, eng-  
elska, franska, ryska och spanska. På-  
tryckningsgrupper vill få tyska och  
esperanto inskrivna på listan. Men det  
vore för dyrt och krångligt, anser  
Waldheim.

# Redan betalt?

Din medlemsavgift till UEA, alltså. Inte? Då är det hög  
tid att du gör det!

Avgiften för MJ, medlem med årsbok utan tidning  
är 46,— skr; avgift för MA, medlem med tidning och  
årsbok är 115,— skr.

Tillägg för den som vill vara med i Societo Zamenhof  
och vill stödja UEA ekonomiskt är 230,— skr.

Du betalar till postgiro 14 74 29 - 5, Esperantoförbun-  
det, Specialkonto, Malmö.



## Poemaro kvazaŭ taglibro

*De tempo al tempo* estas poemaro, kvazaŭ taglibro de la aŭtoro dum du-tri jaroj. Enkondukon aŭ klarigon li aldonas ĉe ĉiu poemo aparte, originalaj poemoj en esperanto, en la itala aŭ en la angla. La stilo memorigas pri Baghy, kaj ili pli esprimas senton ol agadon. Melankolio ofte aperas. Kiel ofte ĉe sekvan-  
toj de Kalocsay li preferas iamajn neologismojn kiel: kurta, lanta, tarde. Oni devas konsulti PIV por kompreni la enhavon pro kelkaj neordinaraj vortoj: ergoto, halanĝi, saporo, pantagruela. Ne la prudenton, sed la kunsenton oni devas uzi kiel instrumenton por interpreti signifon de la versoj. Entute pri-  
sinda aldono al la jam riĉa originala poezio en esperanto.

Salex

## Diskoj kaj kasetoj por muzikemuloj

Nun ekzistas ankaŭ eldonejo de muzikaĵoj en la internacia lingvo. Ĝi nomiĝas *muzika kulturo* kaj eldonas diskojn, kasetojn ks.

*Muzika kulturo* celas produkti ion, kio samtempe riĉigu la internacilingvan kulturon kaj estu prezentbla al la neesperantista juna publiko sen honto.

Tion *muzika kulturo* klopodas atingi per eldonado de muzikaj kasetoj kaj diskoj kun tradukoj de nacilingvaj kaj origi-

nale esperantlingvaj ne 'patosaj' kantoj.

Tiucele *muzika kulturo* serĉas kunlaborantojn, tiujn, kiuj kutimas kanti, ludi muzikilojn, traduki aŭ simple aŭskulti.

Por koni la labormanieron de *muzika kulturo* mendu ekzempleron de nun vendata kantokaseto «Horo da opozicio». Temas pri 21 prisociaj kantoj.

La vendoprezo, pagota post la ricevo, estas 3 000 italaj liroj, ĉirkaŭ 16 kronoj. Kaj jen la adreso: *muzika kulturo*, ĉe Centro di Documentazione Esperantista, via dei Sabetelli 54, I-00185 Roma, Italio.

## Ondlongo ŝanĝita

La *Ĝoja Espero*, esperanta programo de Ibra Radio devis denove ŝanĝi la ondlongon. La nova ondlongo estas **6 010 MHz** aŭ **49,92 m**. La esperanta programo estas ĉiun mardon je la 21.30, laŭ sveda tempo.

## Marjorie Boulton gasto de *Hodiaŭ*

La apuda *Hodiaŭ* estas 'prunteŝtelita' el tute nova libro kun la titolo *Poezia bukedo* (por geknaboj de la mondo). Al ĝi Marjorie Boulton skribis antaŭvorton, kiun ni trovis tre trafa. Al la libro mem ni revenos en unu el la venontaj numeroj de *La Espero*, per recenzo kaj prezento.

# HODIAŬ

## Ni tro ofte kapablas igi esperanton seninteresa

*Ni esperantistoj, kiuj scias per sperto, ke esperanto malfermas multajn novajn vojojn al nia esplorado, ebligas al ni pli variajn amikecojn kaj malŝlosas multajn pordojn kontraŭ aliaj fermitajn, kompreneble deziras, ke multaj infanoj lernu kaj uzu esperanton. Ankaŭ por ili esperanto povos poste igi la vivon multe pli interesa.*

*Sed ni plenkreskuloj ofte kapablas igi eĉ esperanton seninteresa. Ĝi povas iĝi nur unu el la multaj temoj, pri kiuj plenkreskuloj adadas, kiel impostoj, artrito, ofendiĝoj, la terura malboneco de la nuna epoko kompare kun la iama epoko, kies teruran malbonecon tiamaj plenkreskuloj same tede lamentadis, malaprobaj, riproĉoj, hejmaj pedantaĵoj, plendoj, plendoj, plendoj. Ni kapablas injekti nian grizigan venenon en vere interesajn aferojn: libron, forajn landojn, religion, politikon, historion, sciencan; jes, eĉ en amikecon. Kaj se esperanto iĝos nur unu el la tedaĵoj, kiujn plenkreskuloj trudadas, infanoj forlasos esperanton tuj, kiel ili forlasas multajn aliajn valorajn, sciindajn, ĝojplenajn aferojn venenitajn, kiam ili eskapas el niaj devigaj povoj. Estas tragike, kiom da homoj vere kredas, ke ili malamas scion kaj kulturon.*

*Tre gravas do la nivelo de instruado, en la hejmo aŭ en la lernejo. Ĉiu lernado, ĉu temas pri astronautiko aŭ pri la arto butoni propran bluzon, postulas ian veran atenton kaj penadon; sed en efika lernado devas esti ankaŭ ia ĝojo.*

*Pri instrumentoj sin concernu instruistoj kaj gepatroj; sed malmultaj kapablas mem inventi ĉiujn instrumaterialojn; kaj unu el la gravaj problemoj por interesa esperanto-instruado estas la manko de legmaterialo alloga por infanoj. Lastatempe la situacio multe pliboniĝis; sed tute ne adekvate por kontentigi la legapetiton de vere legema infano; kaj gravega rimedo por akiri fluan legokapablon kaj skribokapablon, kaj eĉ, kvankam ne tiel ĉeffaktore, konversacian kapablon, estas legado ofta, abunda kaj varia. Kaj se ni deziras, ke infanoj multe legu, ni bezonas ne nur legmaterialon, sed allogan legmaterialon.*

*Do, iu ajn porinfana legolibro, kiu estas en bona esperanto kaj enhavas ion interesan por infanaj legantoj, estas valora; kontribuas al tiu ekzerco kun plezuro, kiu estas tiel esenca parto de sukcesa lingvolernado (eĉ de la gepatra lingvo).*

Marjorie Boulton

# Julklappen

som gläder hela familjen, klubben, vännen:

Den stora esperantoskivan

## TRA L'MONDO

med sånger och visor från skilda länder  
sång av Olivier Tzaut

Pris med moms 88,— kr.

Tzaut ackompanjeras av olika, skickliga orkestrar eller specialinstrument allt efter sångens ursprungsland. Skivan är mycket underhållande och har bl a inköpts av Sveriges Radio.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 20042 Malmö, postgiro 578-5



# La ĉiutagaj vortoj pri beboj kaj bebaĵoj

[Beboj ja ne parolas esperanton, vi diros; kial skribi pri ili? Sed iliaj gepatroj faras tion, kelkfoje, kaj estas utile scii kiel la diversaj objektoj ĉirkaŭ la bebo nomiĝas. Utile ankaŭ por la geavoj! Bonvenon al plia leciono pri **ĈIUTAGA ESPERANTO**. La suba teksto estas bazita sur broŝuro eldonita de la Ruĝa kruco.]

La bebo ofte komencas la vivon ĉe siaj gepatroj en **lulilo** aŭ **litkorbo**. Atentu, ke ĝi ne estu akra ie ajn. La haŭto de la bebo estas delikata kaj povas facile vundiĝi. Vestu la flankojn de la litkorbo aŭ lulilo per ŝtofa **ŝirmilo**.



Post duonjaro la bebo bezonas pli grandan liton. **Kradlito** kun altaj litflankoj kaj altigebla litfundo aŭ flankoj estas plej taŭga. Gravas la distanco inter la **kradstangoj**: ĝi ne estu pli ol 9 cm (7 cm, se la infano estas pli juna), por ke la infano ne povu enpuŝi la kapon inter ilin. Ankaŭ la **latoj** de la litfundo estu tre densaj.

La **matrac**o kovru la tutan litfundon; plej ofte ĝi estas el **ŝaŭmplasto** vestita per kotona tolaĵo. Ankaŭ matracoj plenigitaj per **krinoj**, **kokosaj** aŭ **palmaj fibroj** taŭgas, se la **remburajo** estas firma kaj glata. **Kusenon** beboj ne bezonas. Kiam vi ekuzos kusenon, ĝi havu la larĝon de la lito kaj estu remburita per krinoj. La matracon vi ŝirmas per **retumita guma tuko**, kiun vi kovras per **bukloŝtofa tuko**. La liton cetere vi preparas per la kutimaj litaĵoj: liltuko, kotona litkovrilo kaj eventuale lana litkovrilo.

La vestoj de la bebo estu molaj, praktikaj kaj taŭge varmi-

gaj. Tiujn celojn plenumas **trikota ĉemizeto** (t e ĉemizeto el trikot, ne ĉemizeto, kiun vi trikos), plasta **vindotuko** kun **celuloza vataĵo** kaj super tio trikota pantaloneto. Dum la nokto aldonu trikotan noktoveston.

Se vi eliras kun la bebo, vi aldonas aliajn vestojn laŭ la jarsezonoj: somere kotonan ĉapeton, trikotan aŭ bukloŝtofan pantaloneton, eble trikitan jaketon; vintre longan trikotan pantalonon, trikitan jakon, lanan

ĉapeton kaj la vestitan infanon elportas en **promensako**.


La bebo ofte malpuriga. Ĝi **pisas** kaj **fekas**, sed tio estas tute natura. Pro tio oni bezonas ofte purigi la bebon. Tion oni faras tuj antaŭ la manĝoj, ĉu surgenue, ĉu sur speciale aranĝita tablo, la **vartotablo**. Sur ĝi oni lavas la postajojn de la bebo per **unufoja lavtuketo**, akvo kaj sapo. Se estas bezonate oni ŝmiras la postajojn per **grasa unĝento**. Post tio oni **revindas** la infanon. Unufoje tage oni krom tio banas ĝin.

Sed la bebo ankaŭ manĝas. La unua nutraĵo kutimas esti **mamlakto**. Ĝi estas por la ge-

Pri multaj el la supraj vortoj mi estas malcerta. Se vi havas pli bonajn proponojn, bonvolu sendi ilin al la redaktoro. Se vi povas proponi vin mem aŭ iun alian por verki artikolon por tiu ĉi serio, bonvolu kontakti la redaktoron sen hezito.

## Ĝia vortolisto


lulilo *vagga*  
litkorbo *babykorg*  
kradlito *spjålsång*  
kradstango *spjåle*  
lato *ribba*  
matrac *madrass*  
ŝaŭmplasto *skumplast*  
krino *tagel*  
kokosaj fibroj *kokosfiber*  
palmaj fibroj *krollsplint*  
remburajo *stoppning*  
kuseno *kudde*  
retumita tuko *rutpressad duk*  
bukloŝtofa tuko *frottéduk*  
trikota ĉemizeto *trikåtröja*  
vindotuko *snibb*  
vindaĵo *blöja*  
celuloza vataĵo *cellstoff*  
promensako *åkpåse*  
pisi *kissa*  
feki *bajsa*  
vartotablo *skötbord*  
lavtuketo *tvättlapp*  
unĝento *salva*  
vindi *linda*, *svepa om*  
revindi *byta blöjor*  
mamlakto *bröstmjolk*  
mamnutri *amma*  
kaĉosuko *gröt*  
pureo *puré*  
laktosupo *välling*  
infanĉareto *barnvagn*  
bebportilo *bårsele*  
sidĉareto *sittvagn*  
suĉilo *napp*  
klakileto *skallra*



Kiel nomiĝas la objekto sur la desegnaĵo? Ĉu bebportilo estas taŭga vorto por ĝi?

Bebo ne povas iri. Kiam ĝi estas tre malgranda oni eliras kun ĝi en **infanĉareto** aŭ **bebportilo** [ĉu iu povas proponi pli taŭgan vorton por *bårsele*?]; kiam ĝi kapablas sidi en **sidĉareto**.

Beboj tre ofte amegas siajn **suĉilojn**. Eĉ se ili ne estas ludiloj, ili ofte uzas ilin tiucele. Por veraj ludiloj estas ankoraŭ tro



patroj senpaga, higieno pakita, de la ĝusta temperaturo, kun la ĝusta enhavo kaj facile atingebila de la patrino. La **mamnutraĵo** daŭras kelkajn monatojn, sed iom post iom la bebo devas komenci manĝi ankaŭ alion: verdaĵojn, fruktojn, viandaĵojn, fiŝaĵojn. Ilin la bebo ricevas en formo de **kaĉosupo** aŭ **pureo** (karota, piza pureo, pureoj el diversaj fruktoj ks). Sed dum longa tempo ŝatata mango restas **laktosupo**.

frue. La bebo komencas interesiĝi pri sia ĉirkaŭaĵo je la aĝo de 2 monatoj. Tiam oni povas pendigi super la lito kelkajn kolorajn objektojn. Unu aŭ du monatojn pli poste ĝi ekŝatos sian unuan **klakileton** kaj duonjaron aĝa ludilojn, kiujn ĝi povas mordi: el plasto, gumo aŭ ligno. Poste la tuta mondo estos ĝia.

Franko Luin





# Redan 1913 var esperanto en internationell företeelse

Hur gick det med esperanto 1913? Vi fortsätter vår bläddring genom första årgång av *La Espero*. Denna gång koncentrerar vi oss främst på rubriken *Jorden runt* med korta notiser.

Men först vill vi visa ett diagram som vill visa utbredningen av esperanto i början av 1910-talet. Så här ser det diagrammet ut:



Men nu till notiserna. *La Espero* 1913 hade följande intressant att berätta:

«*England*. — Abdul Baha, ledare för en ny religiös rörelse i Orienten, höll för någon tid sedan i Edinburg ett föredrag om

*Finland*. — Den 8—9 mars ägde tredje finska Esperantokongressen rum i Helsingfors, under stor anslutning av esperantister från alla delar av landet. Beslut fattades att tillsätta en kommitté att avgiva betyg till blivande lärare i Esperanto, samt en annan kommitté att arbeta för Esperanto bland de blinda.

*Kina*. — I Tientsin har öppnats ett hotell med namnet «Hotelo kaj kafejo Esperanto».

*Tyskland*. — Av siffrorna i Tyska Arbetarnas Esperantoförbunds årsredogörelse framgår, att förbundet, som vid 1912 års början omfattade 38 föreningar med 713 medlemmar, vid slutet av året hade 63 föreningar med tillsammans 1,064 medlemmar, vartill under första månaderna innevarande år kommo ytterligare 7 föreningar med 90 medlemmar.

*Amerika*. — En Esperantoavdelning har upprättats vid konst- och vetenskapsakademien i Pittsburg, som är en underavdelning av det storartade Carnegie-institutet.

*Frankrike*. — Kurser för utländska esperantister anordnas årligen vid universitetet i Dijon, och nyligen har ett program för desamma utgivits på Esperanto.

*Spanien*. — Kung Alfonso XIII, som länge varit en anhängare av Esperanto, har stadfäst upprättandet av Esperantokurser vid Madrids universitet, i högre handelsakademien, i S:t Isidors läroanstalt och i en del seminarier. Esperanto skall även införas vid universiteten i Santiago och Saragossa och i en del skolor i Pamplona, Ternal, Mahon och Valladolid.



det internationella hjälpspråket såsom ett medel för världsfredens uppnående, varvid han meddelade, att den nya rörelsens alla anhängare, uppgående till ett par millioner människor i hela Orienten, fått order att studera Esperanto.

*Holland*. — Den 20 april höll de nederländska katolska esperantisterna sin fjärde kongress i Hertogenbosch, vari omkr. 200 esperantister deltog. Mässa och gudstjänst på Esperanto ägde rum.

*Schweiz*. — I samband med

nionde Esperantokongressen hölls i Bern den 31 aug. ett sammanträde av förkämpar för kvinnorösträtten, besökt av 38 deltagare från 9 olika länder. En kommitté tillsattes för anordnande av sammanträden och föredrag i ämnet under nästa världs-Esperantokongressen i Paris.

*Ungern*. — Vid den i Budapest avhållna internationella kongressen för kvinnorösträtten, hälsade d:r Giesswein deltagarna på tyska, franska, engelska och Esperanto.

*Italien*. — Parlamentsledamoten Pascetti talade nyligen för Esperanto i parlamentet, och italienska undervisningsministern har uttryckt sin sympati för språket.

*Skottland*. — Vid kooperatörernas nionde internationella kongress i Glasgow, vari 600 ombud, representerande över två millioner medlemmar av 130,000 kooperativa föreningar, deltog, var språkförbistringen synnerligen stor, så att när William Maxwell förklarade, att man vid nästa kongress kommer att antaga Esperanto som gemensamt språk, hälsades detta med glädje.

*Frankrike*. — Vid «Konkurso Michelin», d.v.s. de storartade pristävlingar i Esperanto, som tack vare den världsbekante franske industriidkaren Michels frikostighet varje år anordnas i Paris, vanns första priset, 2,000 francs, av en ung jur. stud. Gaston Lelarge i Poitiers».

pre  
nu  
mer  
e  
ra!

Heroldo de E.	63,00
Kontakto	34,50
Oomoto	22,00
Sennaciulo	70,00
Literatura	
Foiro	31,00
Kulturaj	
Kajeroj	35,00
Norvega	
Esperantisto	16,00
El Popola Ĉinio:	
1 år	15,00
2 år	22,50
3 år	30,00

Esperantoförlaget  
Fack, 20042 Malmö  
postgiro 578-5

ĈINA MONATA GAZETO EN ESPERANTO

EL POPOLA  
ĈINIO 中国新闻

Dum la abonvarba kampanjo ĝis 31.01.1979  
Abonanto ricevas koloran kalendaron  
Abonvarbanto ricevas ĉinstilan memoraĵon

Abonu ĉe Eldona Societo Esperanto,  
Fack, 20042 Malmö, aŭ rekte ĉe

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN,  
P.O.Kesto 313, Peking, Ĉinio

Abonprezoj:  
1 jaro: 15, skr; 2 jaroj 22,50; 3 jaroj 30,— skr



## Ni rigardas en malnovan kluban albumon

Jen kaj jen fondiĝas grupoj, kiuj ne estas kluboj, sed pli amikaroj, kaj pluraj el ili havas longan vivon. Ulla Luin eksciis, ke unu tia grupo organiziĝis antaŭ ekzakte kvardek jaroj, en 1938.

1938 estis la jaro, kiam ĉiuj atendis militon. Estis ankaŭ unu el la lastaj el la 30-aj jaroj, pri kiuj tiom da esperantistoj nostalgie parolas.

En Stokholmo troviĝis malgranda amikaro de junaj esperantistoj, kaj ili decidis doni al sia grupo la nomon *Migranta rondo*. Kelkaj el ili estis skoltoj, kiel oni povas kompreni el iliaj fantaziaj nomoj: 'Ludde', 'Bonzo', 'Längen' ktp. Ĉiuj ŝatis arbarajn promenojn, bicikladon, liberaeran vivon.

La jaron poste la grupo jam tiom stabiligis kaj kreskis, ke ĝi decidis lui propran somerumejon. 'MoRo' trovis ĝin en Mälardalen apud Jakobsbergs gård, kaj la domo restis ĝia kolektiĝejo dum preskaŭ 20 jaroj.

Al hodiaŭa stokholmano Mälardalen estas nur unu el multaj urbopartoj, ne tre longe for de la urbocentro. Sed antaŭ 40 jaroj tie troviĝis bieno en la proksimeco de la somerdometo. Estis arbaro, kun multaj vojoj inter la mirteloj. Estis banloko je promena distanco.

### Amo kaj estraro

Pluraj grupanoj baldaŭ eniris la estraron de SEF. Solveig Carrfors (nun Edvardsson) estis inter la unuaj. Sven Alexanderson estis sekretario kaj Birger Gerdman kasisto dum preskaŭ la tuta militperiodo. Pli poste Sune Ahlm eniris tiun estraron.

Kelkaj grupanoj, ekzemple Gun kun la nuna nomo Gerdman, estas daŭre inter la gvidaj esperantistoj de Stokholmo.

La grupanoj eĉ geedziĝis inter si: Kerstin kaj Sven, Gun kaj Birger, Kerstin Håkansson kaj Bertil Lundström. Tio certe kontribuis al tio, ke la grupo funkciis dum tiel longa tempo, longe post kiam ĝi ne plu estis junulara.

### Haringaj festoj

Haringoj kaj terpomoj estis la baza menuo de matenmanĝo en la printempa festotago de la «ĉieliro». Post frumatena kolektiĝo en la parko Haga oni komune iris al la domo de Mälardalen. Tiu festo fariĝis tradi-

cio, same kiel kankrofesto en aŭgusto kaj ĉiusomera invito al la stokholmaj esperantistoj viziti la domon.

*Migranta rondo* ne estis nur rondo de migrantoj kaj skoltoj, sed ankaŭ aranĝis kursojn kaj ofte kunestis en vintraj vesperoj.

Ulla Luin

MR-anoj kun gastoj antaŭ sia domo en Mälardalen. La jaro estis 1939.



La bicikloekskurso celis al Viggbyholm. Sur la bildo estas videbla ankaŭ Ernfrid Malmgren, flanko de la vojo.



La Esperanto-klubo de Uppsala ekspoziciis en la universitato.



Ankaŭ la ĉijaran semajnfinan kurson de la klubo de Kungälv akompanis suno. Jen kelkaj studentoj en la herbo

## Kompreneble kluboj agas Legu pri kelkaj ĉi-sube

Se nenio staras en *La Espero* pri kluba agado, tio ne signifas, ke la kluboj ne agas: ili nur forgesas raportojn pri sia agado. Sed nun venis samtempe raportoj de pluraj kluboj.

La plej mallonga venis el **Uppsala**. Ĝi konsistis el foto, sur kies dorsa flanko iu skribis: Universitato. Oni diras, ke bil-

do diras pli ol 1000 vortoj, kaj eble tio estas vera, sed oni volonte ŝatus aŭdi ion pli pri la ekspozicio, kiun la klubo de Uppsala aranĝis en sia urba universitato. La bildon vi povas vidi ĉi-kune.

La klubo de **Kungälv** ankaŭ sendis fotojn, plurajn, pri sia somera semajnfina renkontiĝo. Ĝi okazis en Störshult en aŭgusto kaj ĝi estis vere internacia, ĉar partoprenis kvin nederlandanoj kaj kvar hungaroj; entute estis 24 personoj kiuj diskutis, babilis, kantis, banis sin en la bela kalv-lago, manĝis kankrojn kaj eĉ ... studis. Oni fakte povis ekaŭdi kelkfoje krokodilon, se oni vere streĉe aŭskultis.

La klubo de Kungälv ankaŭ informas, ke la 10-an de decembro ĝi aranĝos familian feston en kunligo de la 30-jara jubilea tago de la Homaj rajtoj. Tiu aranĝo verŝajne okazos en kunlaboro kun la loka UN-asocio.

Raporto venis ankaŭ el **Västerås**. La loka klubo ĉeestis al teatra prezento aranĝita de Amnestio Internacia («Ho, kia glora paco!»). VEK prezentis en la enirejo la esperantlingvan afiŝon de Amnestio kun laŭvorta sveda traduko kaj kun la surskribo «En affisch för Amnesty International på ESPERANTO, ett språk som gjort för dess verksamhet».

Tri tagojn pli poste, la 31-an de oktobro, kiam la loka sekcio de la Unuiĝo de modernlingvaj instruistoj aranĝis podian diskuton pri la estonta rolo de la modernaj lingvoj en la lernejo. Ossian Pålberg kaj Wim Posthuma havis la eblecon esprimi sin, eĉ se montriĝis, ke ilia interveno ne estis bonvena. Sed la tutan tempon reprezentantoj de VEK staris ĉe la enirejo kun afiŝoj faritaj ĝuste por tiu vespero. Sur ili oni povis legi i a:

«Ni esperantistoj opinias, ke estas klare

ke la lernejan fremdlingvan instruadon gvidas malperspektiva pensmaniero, kiu donas privilegiojn al iuj lingvoj, diskriminacias aliajn, eĉ nian propran;

ke oni devus iom post iom enkonduki esperanton en la lernejon.

Ni esperantistoj esperas ke oni ĉesigos la subpremadon de minoritataj lingvoj; ke pli multaj ricevos tiun



«ŝlosilon al komunikado» kiun ni esperantistoj posedas jam hodiaŭ;

ke perspektiva solvo de la linva problemo ricevu pli da spaco en la edukado.»

El okcidenta Svedio alvenis raporto sendita de **Inter**, pri la prelegvojaĝo de pastro Albino Ciccanti, kiu denove gastis nian landon. La bildo montras lin kaj lian tradukiston Lennart

Åberg en la gimnazio de Skövde, la lastan de oktobro.

Kiel kutime la gazetaro atentis lian viziton. Ni ne havas ankoraŭ informon pri la kvanto de vizititaj lernejoj, sed ĝi certe estos alta, kiel dum la antaŭaj jaroj. En multaj lernejoj cirkulis listoj inter la geaŭskultantoj, sur kiuj oni povis noti sian nomon kaj adreson por ricevi pli da informoj pri esperanto.



Pastro Albino Ciccanti en gimnazio en Skövde, dum sia prelego pri s. Francisko. Tradukis lin en la svedan Lennart Åberg.

# Nur 7 kr

kostos al vi numero nul de la unika aktuala semajna revuo en esperanto

## SEMAJNO

kun multaj interesaj artikoloj sur 40 paĝoj. Leginda por esperantisto de ĉiu lando, ĉiu aĝo, ĉiu medio. Konvinkigu mem!

Mendu per pago de 7,- kronoj al Esperantoförlaget, poŝtĝiro 578 - 5

— ANONCETOJ —

## Dek pri korespondado kaj unu pri poŝtstampoj

**19-jara iranano** serĉas amikojn en Svedio. Mostafa Nadi, 64 Nasiri st., Tehran 18 Rej, Irano

**35-jara kuracisto** deziras korespondi kun gesvedoj. Dro Slavka Tiševa, BG-5841 Grivica Bulgario

**Pri montgrimpado**, vojaĝoj, literaturo kaj la esperantomovado deziras korespondi 29-jara fraŭlino, je la fino de siaj studoj de etnologio. Rada Benić, Helc, Surdugička 5, YU-11000 Beograd, Jugoslavio

**Barcelonano** 42-jara kun edzino kaj trijara infano serĉas kontakton kun sveda paro. Interesiĝas pri montoj, miniaturaj ŝipoj, muziko. Joaquim Pueyo Sopena, Cañameras 21, Barcelona (16), Hispanio

**Radioteknikisto** 28-jara ŝatus koresponde ricevi geamikojn en Svedio. Andrzej Kosinski, ul. Sieniawska 17/13, PL-68-200 Zary, Pollando

**Pri moderna muziko**, sporto kaj filatelio deziras korespondi 25-

jara polo. Stempieñ Ryszard, ul. C. Skłodowskiej 9, PL-59-840 Zawidów, Pollando

**45-jara belgo** deziras ekkorespondi kun similaĝa svedino. Li estas instruisto, sola. Leon Lambin, 7, rue de Bomel, boîte 4, B-5000 Namur, Belgio.

**Skribu al Venezuelo**, ekzemple al Alvaro Calderon, kiu studas por fariĝi inĝeniero. Lia adreso: San Fidel a San Rafael No 16, Sarria, Caracas, Venezuelo

**Estona sinjorino**, 29-jara, kiu interesiĝas pri naturo, turismo, literaturo kaj kolektado de poŝtmarkoj emas korespondi. Leili Linuas, sh. Pioneeri 12-8, SU-202900 Viljandi, Sovetunio

**Katalogo** pri esperantaj poŝtstampoj estas havebla ĉe Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau, Germanio. Kostas 8 DM aŭ 10 int. resp. kup.

**Terkulturiston** korespondanton en Svedio serĉas Tadeo Sobieraj, ul. Wispiańskiego 5c/6, 75-627 Koszalin, Pollando

Konstrui per

# YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



## YTONG AB



lun malfruan vintran vesperon mi promenis sur la perono kaj atendis la lastan trajnon. Tiam mi rimarkis viron, kiu staris antaŭ ia aŭtomato kaj blasfemis. Dufoje li minacis al la aparato per pugno. Mi pensis, ke li tuj tuj batos ĝin. Mi estis kompreneble scivolema, tial mi silente proksimiĝis por aŭdi, kion li diras. Sed li aŭdis min kaj turniĝis al mi: «Ĉu vi estas tiu viro, kiu ĵus estis tie ĉi?»

«Kie?» mi demandis. «Jam kvin minutojn mi ĉirkaŭpromenas.»

«Tie, kie vi staras», li grumbliis. «Kie vi kredas, ke estas tie ĉi, — ĉu eble tie?» Li aspektis iom ekscitita.

«Povas esti, ke mi pretere pasis ankaŭ tie ĉi, se vi tion kredas», mi respondis. Mi parolis atente, ĝentile, por montri al li kiel neudukita li estas.

«Mi miras, ĉu vi estas tiu viro, kiu antaŭ du minutoj alparolis min?» li respondis.

«Ne», mi diris. «Bonan nokton.»

«Ĉu vi certas pri tio?» li persistis.

«Vi ne tiel rapide forgesus tion, se mi estus parolinta al vi», mi respondis. La viro parolis rekte ofende.

«Ne ofendiĝu», li respondisheziteme. «Mi kredis, ke vi estas tiu, kiu antaŭ iaj du minutoj parolis kun mi.»

Tio kvietigis min; escepte de mi li estis la sola homo sur la perono kaj mi devis atendi ankoraŭ kvaronan horon. «Ne, ne estis mi. Kion vi deziris de li?»

«Vidu, antaŭe mi ĵetis unupencan moneron en tiun ujeton tie, por ricevi skatoleton da alumetoj, sed tiu diabla aparataĉo malfunkciis kaj mi kolere skuadis ĝin kaj blasfemis. Tiam proksimiĝis viro similaspekta al vi — ĉu vere ne estis vi?»

«Vere ne», mi respondis. «Tiom mi ja agnoskus. Do, kion li volis?»

«Li vidis, kio okazis, aŭ li divenis. Li diris: tiuj aparatoj estas plumpaj. Oni devas scii trakti ilin. Mi diris al li: 'Oni devas eltiri ilin kaj ĵeti en la maron, tio estas. Mi koleras, ĉar mi ne kunhavas alumetojn kaj tre bezonas ilin.' Li diris: 'Tiuj aparatoj kelkfoje petolas. Tiam oni devas enigi novan moneron, la unua kutime ne estas sufiĉe peza, dum la dua monero funkcias la risorton, tiel ke vi ricevas tion, kion vi deziris kaj krom tio ankaŭ vian pencon. Mi jam plurfoje tiel faris.' Ja, tiu klarigo ŝajnis al mi stulta, sed la viro aspektis kiel se li kreskis kun aŭtomato kaj mi estis sufiĉe stulta por obei lin. Mi enĵetis moneron, kiun mi kredis penco.

## Jerome K. Jerome: Ne sekvu konsilojn!

Sed nun mi vidas, ke estis duŝilinga monero. La stultulo iamaniere pravis: jen kion mi ricevis!»

Li premis bonbonskatolon antaŭ mian nazon.

«Du ŝilingoj kaj unu penco! Mi vendas ĝin por triono de miaj kostoj.»

«Vi ĵetis la moneron en eran truon.»

«Mi scias», li respondis kontente, kiel ŝajnis al mi. Li ne estis ĝentila viro. Se iu alia estus tie, kun kiu mi povus babilii, mi lasus lin.

«Ke mi forĵetis la monon, tio ne tiom kolerigas min; sed ke mi ricevis tiun ĉi diablan aĵon, tio malkvietigas min. Se mi trovas tiun stultaĉan stultulon, mi per ĝi fermus al li la bekon.»

Ni iris silente sur la perono.

«Ja ekzistas tiaj homoj sur la mondo», li komencis, kiam ni turniĝis. «Homoj, kiuj en ĉion enmiksiĝas kaj al ĉiu donas konsilojn. Iam mi pro iu tia stultulo eĉ sidos en karcero, mi scias. Siatempe mi havis ĉevaleton.» (Mi taksis la viron etbienulo, lia vorto iel odoris de tero kaj sterko.) «Ĝi estis vera kimra ĉevaleto, belega besto. Tutan aŭtunon mi paŝtis ĝin kaj iun tagon mi volis iom promeni ĝin. Mi ĝuste havis iajn okupojn en Amersham. Mi jungis ĝin kaj ekveturis tien, estas nur du mejlojn for de mia kabano. Ĝi estis iom malkvieta kaj multe ŝaŭmis, kiam ni atingis la urbon. — U viro staris ĉe la sojlo de la trinkejo. Kaj li diris: 'Tio ĉi estas belega ĉevaleto.'

'Jes, vere ĉarma,' mi diris.

'Oni ne rajtas ĝin tro rapidigi, dum ĝi estas juna.'

Mi diris: 'Dek mejlojn ĝi havas malantaŭ si kaj mi havi planan laboron por malsovaĝigi ĝin. Mi estas certe pli elĉerpita ol ĝi.'

Mi eniris, aranĝis miajn aferojn kaj kiam mi eliris, la viro daŭre staris tie. — 'Ĉu vi viros laŭ la suprenvojo?' li demandis min.

Jam dekomence la viro iel malplaĉis al mi. Sed mi diris: 'Nu, ja, mi ja devas atingi la alian flankon, kaj se ne vi havas novan patenton por fari la suprenvojon, sen veturi supren, mi devas unue tien.'

Li diris: 'Obeu min! Antaŭ ol vi foriras, donu al ĝi duonlitron da hela biero.'

'Ĉu biero?' mi demandis. 'Stultaĵo, ĝi ja estas abstinenculo.'

'Tio ne gravas,' estis la respondo. 'Donu al ĝi duonlitron da biero. Mi konas ĉevaletojn. Tiu ĉi estas eminenta, malalta ulo, sed ankoraŭ ne sufiĉe fortika. Duona litro da biero, kaj ĝi aliros tiun suprenvojon kiel ŝnurvojo, sen iel ajn laciĝi.'

Mi ne scias, kio estas kun tiuj homoj. Pli poste vi miras, kial vi ne forbatis lian ĉapelon de la kapo, aŭ puŝis lin en akvoportun. Sed unue vi obeas lin. Mi mendis duonlitron da biero kaj elportis ĝin el la trinkejo. Duona dekduo da bubaĉoj staris tie ĉirkaŭe kaj kompreneble diligente mokis min.

'Vi igas la ĉevalon sur pekan vojon,' diris unu el ili. 'Venontfoje ĝi volos kartludi, ĝi prirabos bankon kaj murdos sian propran patrion. Tio estas ĉiam la sekvo de bierglaso. Vi legu esplorojn pri tio.'

'Tion ĝi ja ne trinkos', opiniis alia. 'Ĝi ja estas sengusta kiel verŝakvo. Iom da ŝaŭmo estas bezonata sur ĝi.'



'Ĉu vi eble havas ankaŭ cigaron por ĝi?' demandis la tria.

'Taso da kafo kaj buterpano pli plaĉus al ĝi en tiel malvarma tago,' rimarkigis la kvara.

Tiun fluidaĵon mi jam volis forverŝi aŭ mem eltrinki; ĉar estis vere stulte doni bonan bieron al kvarjara ĉevaleto; sed tuj kiam la besteto ekflaris la trinkejojn, ĝi etendis la kapon kaj trinkis kiel honesta kristano — kaj mi ensaltis la ĉaron kaj ni ekmarŝis en bruego. La suprenvojon ni venkis tute facile. Poste la trinkejo atingis ĝian kapon. Jam plurfoje mi akompanis ebriulon hejmen, kaj ne ekzistas pli malagrabra okupo. Ankaŭ

ebriajn virinojn mi jam vidis, ili estas eĉ pli teruraj. Sed neniam ajn mi pretos okupiĝi pri ebria ĉevaleto. Ĉar ĝi estas kvarpieda, ĝi kapablis stari, sed rekte ĝi ne povis iri, gvidata ĝi ankaŭ ne volis esti. Jen ni estis je unu flanko de la vojo, jen je alia. Kiam ni ne estis je la flanko, ni staris oblikve, en la mezo. Malantaŭ mi mi aŭdis biciklan sonorilon, sed mi ne rajtis turniĝi. Al la biciklanto mi povis nur krii, ke li restu kie li estas.

'Mi volas preterpasi!' li ekkriis, kiam li alproksimiĝis.

'Facile dirite, sed vi ne povas.'

'Kial ne? Ĉu vi deziras la tutan vojon por vi mem?'

'Jes, kaj ankaŭ iom pli,' mi respondis.

Duonan mejlon li sekvis min kaj blasfemis kiel ŝuisto. Kaj ĉiam, kiam li vidis iom da spaco li volis preterpasi. Sed la ĉevaleto malhelpis lin. Mi kredas ke vere nur pro obstino.

»Vi ja tute ne scias konduki,' kriis la biciklanto.

Li pravis, kaj mi jam estis tute elĉerpita. Sed la biciklanto finfine ankaŭ eksplodigis min.

'Kial vi tion diraĉas al mi! mi rekreiis. Insultu la ĉevalon, se vi nepre devas insulti. Mia kapo estas plena eĉ sen tiu via sonorilado. Malaperu anstataŭe, vi nur incitas ĝin.'

'Kio okazis al via ĉevalo?'

'Ĉu vi estas blinda?' mi respondis. 'Ĝi estas ebria.' — Tio

sonis stulte, sed la vero ofte sonas stulte.

'Jes, unu el vi estas ebria,' li respondis. 'Je Dio mia, plej volonte mi vin elĵetus el la ĉaro.'

Eble li tion farus, mi estus tre kontenta, se li eltirus min el la ĉaro. Sed tio nek estis destinita al mi nek al li. Tiam la ĉevaleto turniĝis, verŝajne la biciklanto tro proksimiĝis al ĝi. Mi aŭdis krion kaj blasfemon, kaj jam mi estis malseka de la kapo ĝis la piedoj. Poste la ĉevalaĉo ekkuris. Ĉarego venis renkonten, la ĉaristo ronkis alte sur la ŝarĝo. Estas honto, kiel senzorgaj estas la ĉaristoj — estas vere strange, ke ne okazas pli da akcidentoj.

(Daŭrigota)